

Ĉineske

(20)

e-Librigita de Elerno

junio 2022

Busuanzi (Aŭguristo)

Ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de
55,75 silaboj kun duona rimo.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Vespera Suno

**Vespera suno
dolĉe trankvilas,
sur ĉiel' de aŭtuno
milde jubilas**

**Malfrua amo
pasie brilas,
plene de arda flamo
sune similas.**

Chaitoufeng

(Feniksa Harpinglo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po ok versoj de 3,3,7; 3,3, 44, 1, 1*, 1* silaboj, kun rimaranĝo de aaa, bbxbBB kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Beno

**Fraŭla am'
sen ornam'
daŭras plene de deklam'.
Jen fraŭlin'
korinklin'.
Kiun amas
li kun obstin'?'
ŝin, ŝin, ŝin!**

**Alta am'
kiel flam'
ardas en la koro jam.
Ho fein'
laŭ destin'.
Kiun benas
ni do sen fin'?'**

vin, vin, vin!

Genglouzi (Kanto de Akva

Horloĝo en Nokto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po ses versoj de
33,6;33,5; / 33,6;33,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xaa,xbb /
xcc,xdd (x=senrima)

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Tosto

**Jen ŝvebas, freŝa vent',
tra vasta firmament'.
Jen helas, la stelo,
sur la ĉielo.**

**Jen brilas, hela lun',
en mezo de aŭtun'.
Ni tostu, kun ĝojo,
per unu fojo!**

Jianzi Mulanhua

(Mallongigita Melodio

Magnolia)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de
4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Firmamento

**Ho aŭroro,
ruĝora kiel floro.
Suno brilas,
sur firmament' jubilas.**

**Ho zefiro,
kun freŝa bondeziro.
Luno helas,
tra stelriver' fabelas.**

Niannujiao

(Ĉarma Kantistino)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de
436, 436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimarangô
xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)

Gu Hao

Rigardi foren sur Ĝongŝan-monto

Ni rigardu
foren al
ĉio tra bela ter'.
Nia Ĉini'
meritas
nomon de ŝtala fer'.
Nuboj dancas.
Surfoj ondas
nur kiel neĝer'.
Elitoj 'stas
cis kaj trans la river'.

Kun grandioza plan',
antaŭen velu
en primaver'.
Disŝvitu por
senigi

homaron je sufer’.
Vi ekridos
pro centjara
frukto kun fier’.
Por granda song’,
ni tostu al ciel’.

elĉinigis **Zhuang Qixiong**

Pusaman

(Budhista Dancisto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de
7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Sopiro

**Lunlumo feble brilas,
lagakvo jen trankvilas.
Via vizaĝo
en la miraĝo.**

**Ĝemas zefiro,
plenas sopiro.
Ni ĝojus deve,
kuniĝus reve.**

Shiliuziling

(Dekses-Silabo)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj,
laŭ rimarangô a,a,xa (x=senrima)

Eto

Monto kaj nebulo

Sur
Monto ludas kun plezur’
nebulo
de griza velur’.

Ĝi
volvas Monton per fumstri’
blanketa
kvazaŭ en magi’.

Jen
ĝi fieris: “Kia scen’
ekestas
en vintra maten’!”

Sed
diris Monto en kviet’:
“Momenton,

sen laŭda obsed'.

Nu,
elvenos sun' sur la blu',
via bel'
senos en detru'.

Sun'
elvenas kun varmbrakum'
al mondo
kaj estaĵoj nun.

Bel'
de nebul' jam en degel'
foriĝis
en vama dispel'.

Li Weilun

La kvar sezonoj

Jen
floras floroj en ĝarden'.
Printempo
gaja, ĝusta ven'.

Ter'
ĉiam verdas en somer'.
Varmega

estas la veter'.

Nun

Flavas, ruĝas la aŭtun'.

Sur ĉiel'

pendas ronda lun',

Vent'.

Tero plenas je arĝent'.

En vintro

ĉiam frosta sent'.

Patrino

Vin

mi ja amas, karpatri'n'

Tutviva

amo sen la fin'.

Vin

sopiras mi, karpatri'n'.

Vi fortas

ĉiam kiel pin'.

Vin

mi kordankas, karpatri'n'.

Mi kreskas

jam en via sin'.

Mandio

Umefloro

En
neĝo kaj glaci-katen’
ne floras
floroj en ĝarden’.

Nur
umefloro kun plezur’
disfloras
en neĝ’ sen makul’.

Ĝi
en purblanka neĝo pli
aromas
sub la sunradi’.

En
blanka fono de maten’
ridetas
umefloroj jen!

Sur
montdeklivo ŝvebas nur
aromo
pika sen mezur’.

Ŝat'
nia al ĝia parad'
kuŝas en
viv' sur sukavat'.

Ebrieco

Vin'
pelas homon al inklin'
al stato
ebria mensŝpin'.

Ne
io iras al l' ide',
nur kun ĝu'
nebuleca tre.

En
menso ne klara
kompren'naskiĝas
krom ĝoja festen'.

El
cerbo kreiĝas fabel'.
Nenio
ne estas de bel'.

Li

**nun bravegas kun defi'.
Danĝeroj
mankas en ebri'.**

**Sur
bordo li ĵeti kun rul'
kuraĝas
en akvo kun hul'.**

**De
klifo li kontraŭ pere'
desaltas
suben al ŝose'.**

**Bak'
fajra per brula atak'
ne povas
vundi lin je l' brak'.**

**Li
ĝojas ĝui sen konsci'
ĉi ĉion
ja en fantazi'.**

**Ve,
ebriul' en mens-pane'
vekiĝu
al klara ide'!**

Spektado al sunleviĝo

Sur
monto vento kun susur'
alblovas
en rapida kur'.

Ni
sunleviĝon kun radi'
atendas
nokte en anksi'.

Kor'
nia jen al tiu hor'
sopiras
ĉe bela aŭror'.

Jen
aperas luma faden'
subtila
de frua maten'.

Kri'
subite elas el mi
akuta
kvazaŭ sen konsci'.

Ĉe

horizont' ekbrilas tre
la lum' je
malluma pere'.

Stri'
da ruĝo elsaltas pli
el nuboj
ŝajne kun magi'.

Sun'
arka en nebul-brakum'
gravedas
je orbrilo nun.

Tuj
suno sin levas sen sku'
el brumo
kaj elas ĝojbru'.

Ĝis
nun la sunlumo per kis'
karesas
la teron en briz'.

Persokfloroj ruĝas

En
varma printempa maten'
radias

bela flormien’.

**Jen
ekruĝas la floroj en
la korto
kaj en la ĝarden’.**

**Sen
makuloj, sed kun purplen’
ĝi ruĝas
kiel la ruben’.**

**Jen
persikfloroj sur la scen’
fieras
sub sunlum’ sen ĝen’.**

**Sen
ajna nebula katen’
ĝi estas
kvazaŭ sur saten’.**

**Mi
amas kun ĝoja ebri’
ĝin tree
en vigla magi’.**

Ĉu

ŝi kaŝe venas sen bru'
por ame
ĉeesti kun ĝu'?

Mi
komprenas, ke estas ŝi,
vere ne
mia fantazi'.

Sero

Forgeso

Vi
povas forgesi sen sci'
printempon
jen pro apati',

sed
ne l' rakonton sur la sled'
inter ni
kun ama kunmet'.

Se
vi eĉ ĝin forgesos, ne
forgesu
pri nia ide'.

Ĉar

**mi ĉiame sen erar’
tenas vin
en kora vual’.**

**Nu,
reciprokas nur ni du
la amon
firme ja sen sku’.**

Vento en somero

**Jen
leviĝas vent’ kun varmplen’
sub suno
kun iom da prem’.**

**Ĝi
balaas per sunradi’
la teron
aŭ! kun hurla kri’.**

**Ĉu
tio ja heroldas, nu,
pluvŝtormon
kun pov’ de detru’?**

**Post
tempeto ĉe venta vost’
alvenas**

la pluvega tost’.

Vent’
pelas homojn al tegment’
por ŝirmi
sin de pluva dent’.

Hor’
da forta pluv’ sen fervor’
ĉesiĝas,
nur restas vapor’.

Jam
vent’ ripozas en lum-ban’
langvore
kiel lud-infan’.

Vundita birdo

Sur
branĉ’ vidiĝas la kontur’
de birdo
en pluva nebul’.

Ĝi,
vundita kun trista kri’,
pepadas
kvaz’ en agoni’.

Ĉu
bub' per katapulto, nu,
ĝin vundis
por amuza ĝu'?

Ve,
ne venas al mi ide'
por savi
ĝin de la pere'.

Pli
bone, do, forflugu ĝi
al kara
la birda soci'.

Aŭroro

Per
radioj ĝi kun esper'
alvenas
jen el la ĉiel'.

Ĝi
frapas fenestron de mi
malpeze
ja sen ajna kri'.

Ĉe
mia lito mole tre

**min vekas
al matena te'.**

**Lum'
taga kovras plankon nun
per helo
de la brila sun'.**

**Mi
min levas el songêbri'
por taga
viviga misi'.**

Yanke

Neĝas nun

**El
la nubkovrita ciel'
faladas
neĝo en ventpel'.**

**Vent'
kirlas el la okcident'
neĝerojn
en flirta prezent'.**

**Sur
la tero sterniĝas pur'**

**de blankneĝ'
jen kiel velur'.**

**Mond'
tuj mutas en frosta ond'
en sia
al neĝo rekont'.**

**Jam
ne pepas kiel iam
birdparoj
en kverad' de am'**

**En
stratoj paŝas en promen'
ne homoj
en neĝa katen'.**

**Lud'
infana en neĝa krud'
vidiĝas
en en ĉi minut'.**

**Nur
en domo fajr' kun sursur'
varmigas
je homa plezur'.**

Herbo en monto

Post

**foriro de vintra-frost'
alvenas
la printempa tost'.**

El

**la fendo de monta ter'
aperas
ia verda bel'.**

Ja,

**herbŝos' elŝovas sin tra
la grundo
per penego, ha!**

Vent'

**blovegas el okcident'
por ĝeni
ĝin jen per turment'.**

Jen

**pluvo ĝin batas per pen'
por puŝi
ĝin ĝis morta sven'.**

Sed

**ĝi firme staras sen ced',
ankoraŭ
Kreskas en kviet'.**

**Sun'
donas varmon per brakum',
ĝin helpas
ankaŭ la lunlum'.**

**Ĝi
ja strebas kun energi'
al alto
per brava defi'.**

**Kun
svelta kaj longa tig' nun,
fiere
ĝi staras en jun'.**

Laŭflora aromo

**En
aero super ĝarden'
disŝvebas
dolĉa aromplen'.**

**Flor'
laŭra spiras en ĉi hor'
aromon**

en venta favor’.

Per
grajngranda korp’ en aper’
ĝi pavas
en sunluma hel’.

Al
okul’ ĝia flava pal’
ja plaĉas
sur eta petal’.

Ĉu
ĝi donas per aerflu’
aromon
jen al nia ĝu’?

Pino

Pin’
staras alte sur montpint’
verdplena
kun fera anim’.

Ĝi
radikas kun energi’
en teron,
kreskas kun pasi’.

Ĝi
strebas alten kun konsci'
decide
jen sen fantazi'.

Ĝi
ĉiam fronte al defi'
batalas
firme sen anksi'.

Ĝi
kreskas pompe pli kaj pli
en venta
kaj pluva muĝ-kri'.

Ĝi
tamen falas ja sensci'
pro homa
detrua magi'.

Vintro

Vent'
malvarma el okcident'
ekblovas
per korp-pika sent'.

Neĝ'
falas sur alta montegê'

**kviete
en gela sieĝ'.**

**Blank'
kovrila de flank' al flank'
vualas
sur la tera plank'.**

**En
severo de la neĝ-regn'
verŝajnas
morta la ĝarden'.**

**Nur
regas brile blanka pur'
sur ĉio
en venta susur'.**

**El
grizblanka vasta ĉiel'
disfalas
flokoj en liber'.**

**Jen
amasiĝas neĝ' en scen'
pli kaj pli
kun frida plenplen'.**

Dom'
varma kiel la patron'
protektas
homojn laŭ sezon'.

Nur
infanoj ja en konkur'
ludadas
kun neĝ' en plezur'.

Ĉu
ili nur ludas kun ĝu'
sed timas
malvarmon ne plu?

Sed
neĝo estas nur obsed'
portempa,
ne tutjara ted'.

Aglo

Sor
flugas sub venta favor'
ĝi rekte
al blua kolor'.

Sur
vasta ĉiel' kun plezur'

**ĝi serĉas
forton de fer-dur'.**

**En
aer' ĝi glisas sen pen'
zigzage
tra la sunlum-plen'.**

**Ĝi
rigardas kun ironi'
al predo
jam en angoni'.**

**Jen
ĝi plonĝas al la ĝarden'
kaj kaptas
ĝin per ungopren'.**

**Ĉu
ĝi similas al rab-ĝu'
de l' ŝtato
en la mond' de bru'?**

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Aŭtunmezo

**Vent'
freŝas tra la firmament'**

**favore
el la orient'.**

**Stel'
la plej vigla sur ĉiel'
en nordo,
saĝas laŭ fabel'.**

**Lun'
plena meze de aŭtun'
helegas;
kune tostu nun!**

Tiaoxiaoling (Flirta Kanto)

Ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Kiso

Amo, amo
ardas kiel flamo.
Kisi iĝas deve,
daŭras plu eĉ reve.
Vere, vere
dolĉas kis' tenere.

Feino

Kara, kara
feino elstara!
Ĉarmas via voko,
eĉ moliĝus roko.
Koro, koro
mia iĝus floro.

Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)

ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj
laŭ rimarangô xa,xa,a (x=senrima).

Eto

Infanoj ĝoju

okaze de l' Internacia Infana Tago

Infanoj
en la festa tag'
devus ĝoji kun rido
en milda patrino brak'
aŭ en paca pak'.

Militfajr'
tamen sur la ter'
brulas tre arde ĉie
kaj bomboj per la sufero
falas el ĉiel'.

Ne kaŝej'
protektas bone
l' idojn sur la vastejo.
Ili ploras laŭtsone,
vagas ĉifone.

Malsato

**estas problemo
por ilia stomako.
ne vidiĝas ja greno
nek ridmieno.**

**Infanoj
dum tag' kun ploro,
nokte en mava dormo,
petegas en angoro
por pan-trezoro.**

**Precipe
en fi-pandemi'
ili suferas multe,
aŭ disde la famili'
aŭ en agoni'.**

**Ja mankas
taŭga kuracil'
al ili kontaŭ l' plago,
restas nur kor-maltrankvil'
kaj plora ĝem-tril'.**

**Infanoj
en la festa tag'
devus ĝoji kun rido
en milda patrina brak'
aŭ en paca pak'.**

Luiza CAROL (Israelo)

SOPIRO EN ARILO

**Kunulon
la birdo trovas,
preparas neston ame.
La brizo milde blovas.
La vivo novas.**

SOPIRO EN MAJO

**El ovo
eliris idoj
kun fragilajflugiloj,
okuloj kiel bidoj,
gajaj pepstridoj.**

SOPIRO EN JUNIO

**Feliĉo
signifas amon,
komfortan etan neston,
la familian varmon
kaj plenan sanon.**

SOPIRO EN JULIO

**Birdidoj
ĝojasflugante,
soras super la parko,**

**ludas en sun' kantante,
pepas mirante.**

SOPIRO EN AŬGUSTO

**Feliĉo
estas libere
flugi super la mondo,
vivi tute sincere
kaj sendanĝere.**

SOPIRO EN SEPTEMBRO

**Vetero
jen malvarmiĝas.
Birdoj sopiras al sud',
multaj brue ariĝas
kaj deteriĝas.**

SOPIRO EN OKTOBRO

**Flugas
brua birdaro
super dezerta kampo,
super flava arbaro,
super la maro.**

SOPIRO EN NOVEMBRO

**Alvenas
la birda paro**

**al suda varma insul'.
Parfumas foliaro,
ĝojas idaro.**

SOPIRO EN DECEMBRO

**En sudo
ĉio en ordo,
sed bird' sonĝas pri nesto,
sopiras ĉe marbordo
al fora nordo.**

Miric Jadranka (Serbio)

Malvarma printempo

**Printempo
en Majo pluvon
kaj vintron alportis. Ve.
Ni esperas suneton
vidi en London.**

**Malvarmaj
tagoj. Revido
de kurbiĝantaj homoj
sub ombreloj. Kunsido
urĝa sen rido.**

**Tornado
ĉe najbaro fi
aspektas. Danĝero. Ho!
Timas mi pro ĉiel' ĉi.
Pala kiel Vi.**

**Inundojn
prognozas oni.
Nek resaniĝis ni de
pasintaj. Preĝu al Di'
por nin pardoni.**

**Pro natur'
por savi Teron.
Endas purigi akvon
kaj recikli rubaĵon
Redonu Sunon!**

Maja suno

**Kvieta
maten'. Odoras
akacio. Abeloj
tien alien zumas.
Mielon donas.**

**Ekfloris
kaŝtenoj oldaj.
Jen turtoj kveras gaje.**

**Nestoj vigliĝas. Bruaj
birdojflugantaj.**

**Sonoril'
preĝeja laŭte
vokas vin por ĉeesti
baptofesto. Ŝin tute
li stiros aŭte.**

**Suna rid'
varmigas koron.
Kurta paŭzo inter pluv'
Ĝuu vi bonhumoro
kaj dancu oron*.**

**Oro /kolo serbe/-la serba danco-rondo*

Kiam animo ploras

**Tremantaj
animoj niaj
sendormas mi pro dolor',
pro maljustecoj fiaj,
tut-malegalaj.**

**Malgrandas
serbio. Fortas
ĝi. Milionojn donis
por vivi pace. Preĝas
ni pli kaj kredas.**

Suferas
animoj.Ho,ve.
premoj,oftaj minacoj,
tro da ĉantaĝoj por ke
ni vivu aĉe.

Eŭropo
silentis honte.
Subskribojn ili viŝis,
reprenis difektonte
pacon ! Estonte!

Mizera
kaj izola viv'
longe daŭras kaj kaŭzas
konfliktojn pro falsa viv'.
Vivo en ne viv'.

Kanajlo

Videblas
brila okulpar'.
sub somera ĉapelet'.
Vesperiĝas en arbar'.
Domo en najbar'.

Okulo
al okulo. Ho.

**vizaĝo al vizaĝo.
Vangofrapoj kaj ŝoko!
Sangis brovarko.
Lumigis
kandel' la domon .
Miskompreno sed bato ?
Fidu propran okulon.
Streĉas koron.**

**Makuloj
sufiĉe klare
akuzas. Ŝin li batis.
Tio evidentis are .
Vangfrapo pare .**

**Riproĉe
krias rigardoj. ..
Ĵaluzo kaj fi-klaĉoj.
Tiom da vangofrapoj.
Fi-onidiroj.**

Malsekeco

**De post pluv'
aperis suno.
Tuj altiĝis gradon je
tridek! Ĉi natur-puno
pezas je pulmo.**

Videblas

**Lun' klara frue
ol ni atendis. Steloj
sur ciel' brilis are,
eê tremas pare.**

**Frua nokt'
iom da freŝeco
sentas homoj surstrate
ĝojas en ĉi beleco.
Di' senzorgeco!**

**Floretoj
bonodoras tre.
Plenas vazo de rozoj.
Diverskoloraj por ke
vi ĝuu kore!**

**Junia
varma mateno.
Estu sufoka tago
pro malsekec'. Elteno
pezas... Di-beno.**

Tempesto

**Aŭdiĝas
trajnofajfado.
Posttagmeza silento
malaperis. Bruado
de Foirrado.**

**Julia
varmego. Birdoj
kaŝitaj en branĉaro
atendas pluvon. Muŝoj
atakas. Fulmoj.**

**Aero
sufokas. Pluvas.
Ektondris forte. Fulmas.
Ekhajlis kvazaŭ neĝis.
Ĉie blankiĝis.**

**Klimata
ŝanĝiĝo timas.
Tondro frapis junulon
eĉ ŝafaron mortigis.
natur' sovaĝas.**

**Tornado
en najbaro. Ve**

**Danĝero al neni
dezirata. Mira tre
rara vidaĵ'. Ve.**

Ververa platona amo

**Dancas la
ĉiel' kun steloj.
Brietas dia paco.
Luno krozas tra bluoj
de noktolumoj.**

**Ĉarmas nokt'.
Memoroj vekigás. Ho!
Kia sendorma nokto.
Flamas kandelo. Vakso
gutas je floro.**

**Blanka tuk'
Sur ĝi floreto.
Ruĝas rozo kiel am'.
Okulumu, koreto..
Pretas ĉareto.**

**Ekstere
trembrilas lumo.
Pendas lanteroj vice.
Ni gajigás. Festumo.
Fortas brakumo.**

**Estu ni
ebriaj de am'.
Valsaj akordoj glitas
aere por nia am'.
Tre prudenta am'.**

Militŝtormoj

**Hejmloko
Ploranta.. Solis
ŝi sencele paŝanta.
Rifuĝintoj jam ŝokis.
Multaj pereis.**

**Kolonoj.
Kiel pluv' ploroj.
Jam aŭdiĝis pafadoj.
Kriaĉoj. . stop al movoj..
Faladas bomboj.**

**Ve krioj!
Atak' kruelas.
Fuĝo tien alien
Vidaĵo, ja malbelas.
Eĉ tag' malhelas.**

Nigrigis
Ĉio el fumo
Aperis hom' vundita
Serĉanta iun. puno .
Ĉu sort' sen suno.

Malgajas
Rakontoj tiaj.
Ekstermita popolo.
Longas kolonoj postaj.
Ho, serboj piaj.

Suferoj
Kaj doloroj, ho,
Subbrake longe paŝas.
Falsaj esperoj jam tro.
Savas nin kredo .

Pasis jaro

Serĉis mi
vin inter steloj,
je kruciĝo de sonĝoj
inter freŝaj memoroj.

En oldaj fotoj.

**Sur blua
ĉielo naĝas
ŝip' en via senfino.
Via haveno pacas.
Ho, poreternas.**

**Neniel
mi povis kredi
ke neniam ni vidos
Nin. Senvoĉe babili,
nokte vin songi.**

**Sen tuŝoj,
sen zorgoj, sen.... Ve
Pasis jam unu jaron!
La kurteno falis. Ve
Larmoj fluas. Ve.**

**Kial vi
mortis subite,
sen lasta adiaŭo?
Estu memor' laŭrite.**

Al vivo spite!

Korkas boato

Malfrua

somera tago.

Senventa varmega nokt’.

Ofta homa reago

pro fe’ el lago.

Plurtaga

pikniko kun ci .

Mankas elfaj rakontoj

je magia loko. Vi

sorçanta en ĝi.

Vitala

kavaliro, ve

dronis savante sian

princinon vidalvide.

Vokita karme.

Kvazaŭ Elf’

lagon malbenis.

Akvokirlo kaŝita

**mire ilin allogis.
Nur salik' ploris.**

**Jen ĝiaj
pendantaj branĉoj
tuŝas lagon surfacon,
kiel vanaj atentoj.
Restis legendoj.**

Kiam ardas amo

**Ekpepis
sur branĉo birdar'.
Milda ventoblovado.
Jen, sub Tilia branĉar'
brakumanta par'.**

**Kisado
daŭras pli ol hor'.
Krom ĉiela lunombro
ilin kaŝis stela or'
ĝis brila aŭror'.**

**Fajretoj
en okuloj al**

**vibranta stel' similas,
pro amofebro. Tial
fortas amreal'.**

**Viola
aŭrora maten'
Sur horizonto bluas.
Bruas sonoj en plen'
—natura ĝarden'.**

**Ve, mortis
en la vazo plantoj,
pro sufoka somero.
Soifis foje laŭ voj'
gajaj kisantoj.**

Benita lumo

**Oktobra
aŭtuna somer'.
Ĉielo malfermiĝas.
Luno montriĝis . Ja, Ver'
al la pasaĝer'!**

Ŝin oni vidas

**solas surborde .
Ambaŭ vangetoj
ruĝis. Steloj akorde
brilas. En orde.**

**Ondetoj
arĝentas brile.
Murmurante inter si.
Foje Lun' fuĝis mile
de ni. Aprile**

**revenos ,
kiam herbejo
verdiĝos kaj floretoj
ekfloros. En ĉambrejo
danc'. Lumos ejo.**

**Benita
estu nia am'!
Pacon, amikecon. Am'
revenos per am'.**

Vivo unikas

Juneco

**prilongigita
per amo brakumita.
De malbono savita.
Amo benita.**

**Rideta
vizaĝ' radias.
Parolas. En okuloj
feliĉon speguliĝas.
Animo spiras.**

**Malantaŭ
ĉies granda kor'
staras do, fideleco,
staras jaroj da labor'
por milda, bonkor'**

**Facilas
divorciĝi. Am'?'
La vivo lernigas nin.
Ne hontiĝu vi de am'.
Rezignu de lam'.**

Espero

amo kaj kredo
postulas ĉion de ni,
de kapo ĝis piedo!
Ekridu ni, do!

Malfrua aŭtuno

Novembra
pluvo varmeta.
Soifas grundo, Magras
putraj foliar'. Eta
voj' flavruĝeta.

Nebuloj
la urbon kovris.
Ju pli da tempo pasis
des pli nebulo densas .
Poste suniĝos

Malbone
influas nebul'
je homa sano. Tial
certe, diras ĉiu ul':
“Adiaŭ nebul'!”

Paseroj
sub tegmento, ho!
Sur la fumotubo kat',
nigra kat'. Tri katoj tro
supestiĉe! Ho!

Ŝanĝiĝas
veter'. Matenoj
malvarmiĝas. Prujno jam
aperis sur bramĉetoj.
“Varmaj kaŝtenoj !”

Finfine ekis vintro

Finfine
ekis vintro. Ve.
Kvazaŭ printempas vintre.
Klimatoŝanĝo ! Ho, ne !
Ĉio, ja ŝanĝos tre.

Pluventas.
Pluvgutoj lante
faladas je vitro. Dum
li ĝojas muzikante
al ŝi kantante.

**Juna par’
jen , sub pluvombrel’.
Enplektiĝitaj fingroj.
Lipojn kisu, mia stel’,
per dolĉa miel’.**

**Venteto
milde ekblovis.
Dancas nigra harar’. Jen
valson perfekte ludis
gvidata de vent’..**

**Morgaŭa
sereniĝos tag’.
Suno reaperos kun
dentoj. Jen klimato mag’.
Fi, amara sag’.**

Praŭloj niaj bravuloj

**Ploranta
popolo mia.
Preĝas pia loĝantar’.
Ho, regu beno dia**

je koro via!

**Vetero
helpas al homoj.
Neĝo forgesis veni
tre mildas sunradioj
sur pilgrimantoj.**

**Pacemaj
longas kolonoj.
Al Dio pie preĝas.
Ve, iliaj penegoj.
Mutas fi-regnoj.**

**Paŝadas
bravuloj en ar'.
Polico fi-uzata.
Surda estas regnestar'.
Spitas al homar'**

**Ho, ne al
sanktaĵrabado!
Homoj spitas al angor'.
Haltu humiligadon!**

For suferadon!

Sonoriloj sonas triste en Montenegro

**Al serboj:
leviĝu popol'
pro paca infaneco,
pro la digno de popol'.
venas ĝusta rol'.**

**Tre longe
daŭras malbono.
De post tridek da jaroj
pli gravas dia sono
ol krimomono.**

**Mensogoj
regas en la mond'.
Veron oni aĉetas.
Pro tio fariĝis rond'
de la homa ond'.**

**Surprize
okazis popol'!
Vekiĝis digno en ni .**

**Unuiĝo antaŭ ol.
Feru popol’!
Pilgrimas
la serba fratar’
Dio savu nin. Amen!
Defendado de sanktar’
kune kun pastrar’.**

Novaj provoj al homaro

**Griznuboj
krozas sub ĉiel’.
Jen, blankiĝis nubetoj.
Dume videblas tiel
bela flava stel’.**

**Printempaj
revenis birdoj.
Sunaj teneraj kisoj
sur ĝiaj plumoj.**

**Herbejo
jam verdiĝis. Ve.
Baldaŭ ĉio frostĝis.
Pro klimat-ŝanĝo vere**

timis homoj tre.

Vetera

vintra tempeso.

Daŭris mallonge. Iu

zorgis pri sia besto

aŭ pri domnesto.

Fajregoj,

poste inundoj

iĝis teuraj bildoj.

Kvankam multoblas laŭdoj

ol fi faradoj.

Atendante vakcinon

kontraŭ viruso “covid 19”

Februar’

pasis rapide.

Bela paro sidanta

sur benko sub arb’ ride.

jen, vid- al -vide !

Suniĝas

**milde, tuttage.
Briletas sunradioj,
dum hundo bojas vage ,
gaja saltetas mage.**

**Ekfloris
krokusoj bluaj.
Kiel lantern' ĝi lumas
en la horoj vesperaj.
Steloj kandelaj!**

**Migrantaj
revenis birdoj
al Nordo. Malkutime.
Ekfloris rusaj pinoj
de post cent jaroj!**

**Ekfloris
eĉ, fimalsanoj.
Korona virusoj, ve.!
Malpleniĝas urbegoj.
Miloj da mortoj!**

Adiaŭ al neĝo

Ĉielaj

vintraj rozetoj.

Jam floranta ĉielo

Floras ĉerizarbetoj

kun burĝonetoj.

Kvietas

lagosurfaco.

Alflugis insektoj sur

boatoflago. Laco

pasas en paco!

Nokte

aŭdiĝas sonoj

kvazaŭ dancantaj steloj

bruetas aere. Voj'

plenas de lumoj.

Venteto

blovetas lace.

Homoj ludas leĝere.

iuĵ fiĝkaptas pace ,

revas kurace!

**Someraj
varmejoj vintre
dum korona pandemias.
Zorgemoj kreskantaj are .
Ruĝas luno re.**

Avino marta

**Ekfloris
ve, papavetoj
Subite tra freŝa aer'
ekŝvebis neĝeretoj
kiel plumetoj.**

**Rapide
blankiĝis arbar'.
Jen,ornamiĝis pinar'
per blankobrilaj perloj
sur pinbranĉar'.**

**Ekknaras
subpiede neĝ'.
Freŝa surfaco frostas.
Post du tagoj moliĝo,
jen degeliĝo!**

**Printempo
jam surprizis nin .
Unue varmo poste
frosto atentigas nin.
Ĉu vintro sen fin'?**

**Ankoraŭ
unu pli surprizo.
Kvarantenon obei!
Ho, hejma paradizo.
Magia pizo*!**

**Magia pizo aludas al fama monda fabelo "Princino sur la ero de pizo"*

Angoro ni pro covid-19

**Ho, mondo
en kvaranteno!
Timigas nin seka tuso
kaj febro. Jen, subteno
mia kun peno.**

**Restu ni
hejme . Eskstere solaj
je distanco socia.!
Preterpasu ni mutaj
buŝe maskitaj.**

**Virusa
pandemio.Ve
ankoraŭ ne solvita.
Miloj jam mortis kaj tre
multe mortos.Ve!**

**Disiĝas
familianoj.
Oni fermis ŝtatlimojn.
De labor' plenas manoj
kontraŭ malsanoj.**

**Laboris
nokte kaj tage
ni por savi homaron.
Volontuloj senpage
agis senvage.**

Ŝi vidis ĉielarkon

**Ekpluvis.
Aer' freŝiĝas
Milde kasesas vin .. Jen
ĉielarko aperas.
Koloroj viglas**

**Leviĝas
ĉielarko sur**

**blua klara ĉielo.
Sunradioj falis sur
arbon apud mur'.**

**Noktiĝis
tre rapide .
Aperis pala Luno.
Brakumas paron ride.
Ĝus vidalvide .**

**Ektremas
koro de junul'
pro am'ondo kreskonta.
Li estas bona fakul'
sed urba povrul'.**

**Brakumo
forta kiel Lun'
kun stelaro sur ĉiel'.
kiel konfitaĵ' de prun' .
Ardas kiel sun'.**

Ferumigita rivero-Malnova monto/Goĉ-Serbio

**Susuras
betulbranĉaro.
Murmuras rivereto.
Alten fluganta aro.
Nigra birdaro.**

**Aprila
forta ventego.
Ektondris en oreloj!
Poste sekvis fulmegoj.
Jen, ekpluvegoj!**

**En montoj
akvofaloj ne
estas plu certaj. Homoj
katenigis ilin . Ve.
Fiaj ĉi mortoj.**

**Aŭrore
kiu murmuros?
Kiu rulados ŝtonojn?
Kiel monto plu vivos?
Ĉu ĝin plu benos?**

**Vivos plu
en tubo river'.
ferumita.Sklavoviv'.
Kiel malbenita ter'
sen plua prosper'.**

Pluva somero

**Junio
pluvas ŝtormete.**

**Tage aŭ nokte pluvo
enuigas iomete,
diris mi ridete!**

**Odoras
strata tiliar'
miksita kun sufoka
aero. Flugas birdar'
sub griza nubar'.**

**Alogas
nin sunsubiro .
Dum sunaj posttagmezoj
oras ciel'. Jen, miro ,
freŝas sopiro.**

**Malgajas
ni pro natura
fi harmonio,
pro la veter` obskura.
kaj neĝo pura!**

**Somero
jam venis lante.
Pluvoj faris inundojn.
Ni ĝojas esperante
plu vivi kante!**

Ekis somero

Ĉielo

**ruĝis laŭvorte
dum suno malaperis
okcidente laŭsorte .
kvazŭ morte!**

Vetera

**ŝanĝo.Eĉ birdar`
silentas en branĉaro.
malĝojas blanka turtar`
kaj kolomba par`.**

Ventego

**ŝtorme alvenis.
Falis verda foliaro`
ploranta adiaŭis.
Dancante mortis.**

Fajfis

**tondre ventaĉo,
hajlis, jen kugloforme,
sur cikoni` nestaĉo
dum someraĉo.**

Sopiras

ni someron pli

**varman sen kovid virus` .!
Ferioj sukcesaj pli
ol esperus ni!**

Julio

**Julio
iĝis malvarme.
Ŝokis ĉiujn per hajlo.
ŝanĝiĝis veter' pluve
ĉar malvarmis tre!**

**Pluvegoj
subite venis.
dum grizopeza nubar'
puŝanta vente flugis.
Poste ekhajlis!**

**Komence
soife la ter'
akvon sorbis. Pli poste
ekis inundoj. Danĝer' !
Ŝanĝiĝas somer'!**

**Surstrataj
alta tiliar'
jam sekiĝis. Flaviĝis
sur branĉoj la foliar'.
Falis birdnestar'.**

**Somero
ĉi-jare plenas
de viruso infekto.
Ni nin nepre protektas!
Maskojn surmetas!**

Kiam venas memoroj

**Memoras
mi kiel knabin'
vi kavon esploranta.
Vin serĉadis tage mi
ĝis la tagofin'.**

**Laŭlonge
de marbrdo li
hazarde trovis kavon!
Duelira kavo.Vi
diris "Vi kaj mi"!**

**Surdorse
pendis la sako.
En manoj ŝtonĵetilo,
ne estas lia fako,
nur sperto manko.**

**Silentis
kavo interne.**

**Malas al lia spiro.
“Anĝelo” kriis mi. Ne!
Ve, poreterne!**

**Birdeto
mortaĉis vere,
ni ĵetis povran maren.
Ondetoj ĝin tenere
lulis .Ververe!**

Floroj en somero

**Somere
sur kampa tero
pompas buntaj koloroj
de floroj en prospero
en suna helo.**

**Varmege
ardas la suno
sed okulfrapas floroj
en verdherba brakumo
eĉ sub bak-puno.**

**En lago
jen lotusfloroj
l' okulojn kaptas rave
per diversaj koloroj
plaĉaj al koroj.**

**Sur monto
lekantoj are
svingas sin en ventpelo
tenere ondas mare
brilas ĝisvale.**

**Sunfloroj
flavas mature
kun ridetantaj vangoj
ludas en vent' plezure
kapklinas lule.**

**La pejzaĝ'
de la somero
homojn ravas ebrie
plenigas per espero
kaj sorĉa belo.**

Julia somera ondo

**Somera
veter' ardiĝas.
Sufokas tagopartoj.
Tre frue mateniĝas,
longe noktiĝas.**

**Birdetoj
ombre kaŝis sin.**

**Ŝvitante sub ĉemizoj
hastas homoj bani sin
ĝis la tagofin'.**

**Subita
somera pluvo
Birdetoj surstrataj jen
banas laŭ pluvofluo,
en ĉi marĉkuvo!**

**Vigliĝas
birdetaj flugoj.
Etendiĝas flugiloj!
Jam lertas kolombidoj.
Bruas koncertoj!**

**Viruso
ferias ĉe ni .
Altiĝis la nombroj de
mortintoj. Atendas ni
vakcinon de SI!**

Blanka kadro de krucumita popolo

**Noktiĝas.
Ĉielkoloro
tre similas al inko.
Tremanta via koro
pro amdoloro.**

**Aŭgustaj
pezas memoroj.
Neniam forgesu ni :
de popolo suferoj,
rompitaj koroj!**

**Surstrate
aŭdiĝas noktaj,
de popolo tiklemaj,
kantetoj kompatigaj.
Pro atakoj raketaj
el aer` faligitaj!**

**Teneraj
softaj sonetoj
ĉiun animon premas.
Konsolemaj vortetoj
inter ekkrioj!**

**Kolonoj
de rifuĝintaj
homoj. Jen,fi bombitaj.
Ĵus ekstermitaj!**

Malfrua aŭtuno

**Griziĝas
ĉiela nubaro'.**

**Ho, ŝtormo alvenonta
kie kaŝis sin birdar' ?
Sub branĉfoliar' !**

**Odoras
tero laŭ pluvo.
Strata riveret' fluas
kiel larĝa bankuvo
de natur' pruvo!**

**Aŭtunas.
Pluvas okcidente
Varmegas oriente .
Dancas folioj vente !
Larmoj korsente!**

**Velkintaj
herboj mortaĉis.
Eĉ morta falis koten.
Herbaĉoj ĉie kreskis.
Suno bonvenas!**

**Freŝiĝas
de montoj altaj.
Randevuas aŭtuno
kun insuloj glaciaj.
Ŝanĝiĝoj fiaj !**

Alflugis Septembro

Origâs
aŭtuna vesper'.
Super mi alten flugas
gaje birdoj tra aer'.
Folioj sur ter'.

Sur ĉiel'
luno vaganta
inter brila stelaro.
Nokto kosme floranta.
Stelar' tremanta.

Aŭtuno
multkoloriĝas.
Branĉaro aŭ flaviĝas
aŭ foliar' bruniĝas,
putre nigriĝas.

Aero
ĉi-nokte freŝas
Ni pli facile spiras.
Domoj nun bonodoras.
Naturo mildas .

Varmego
sufokas aer'.
Prokrastita somero.
Ŝajnas diabla veter'

pluvas sur la ter'!

Serĉi konsolon

**Mezaĝa
paro. Silento
inter ili doloras.
Ve, larmoj en torento.
Divorc'— fisento .**

**En okul'
via svelta siluet'.
En la malpena ĉambro
nia danco “manuet”'.
Ve, nia duet'.**

**Malnova
pordo fermiĝis.
Preferas vi la novan.
Doloro plilongiĝis.
La am'perdiĝis.**

**Rikolto
riĉa aŭtuna.
Nia mala, malpura.
Ŝia ag' oportuna.
Dank' al mi juna.**

Animo

**disŝirita.Ve.
Melankolio regas.
Ofte vagas Lun' kun mi.
Gaja estu vi!**

Laŭspuroj de iama familia dono

**Muzikon
de la naturo
ĉu vi iam aŭskultis?
Jen, mia aventuro.
Kri' de naturo!**

**Decido
longe farita.
Mi vizitos bienon
de avin' heredita.
Sur altaĵo trovita!**

**Transe de
river' Timoko,
fore de riverbordo.
Al mi okazis ŝoko.
Mizeras loko.**

**Ruino
anstataŭ domo.
Arbusto kaj ilekso!
Nek florbedoj nek homo.**

Nek bestodomo!

**Kun tero
superŝarĝita
iu traktoro foris.
Vinberejo manĝita.
Anim' streĉita!**

Aŭtuna tago

**Krepusko.
Luno tra stelar'.
Ruĝiĝis ĉiel'. Flugis
alten kun krioj birdar'.
Jen, vagas sturnar'.**

**Odozas
tero je pluvo.
Aŭdiĝas tondro ie.
Grundo kvazaŭ bankuvo.
pluva fipruvo.**

**Sub ombrel'
paro brakumita .
Man- en-mane ŝvitanta
pro pasio ŝvelita
ame ligita.**

Ĉirkaŭe

**ŝvebanta flava
disĵetita foliar'.
Kliniĝas al arb' brava.
Jen, bildo rava.**

**Blankiĝas
bird'. Mi vidis ĝin.
Unusola kolombin'
kun idar' en sia sin'.
Mira bird-destin'.**

Ankoraŭ aŭtuno someras

**Lazuras
ĉiel' senfina.
Varmo milde karesas
nin. Tiklas odor' pina.
Natur' diina!**

**Agrabla
promeno. Homoj
malkovras naturbelon
en renaskiĝo. Amoj
tra florsezonoj!**

**Vespero
kvazaŭ limarko
venis frue kaj nuda.
Sur via dorso sako**

lia lanjako!

**Vetero
ofte trompema
kaŭzis malsanojn. Tial
nek estu hezitema
nek suspektema!**

**Malfrua
aŭtun' brilas kaj kore
nin salutas. Ni festu
venontan vintron kore ,
anime glore!**

Post pluvo aperis ĉielarko

**Malfrua
aŭtuno freŝas.
Post sufoka somero profunda spiro
plaĉas.
Tial ni ĝojas.**

**Tenere
svingiĝas branĉet'.
Kveras blanka kolombet'.
Gajas birdoj en kvartet'.
Bruas ĉi parket'.**

Susure

falas foliar’.
Vento ŝtelas iuj,
por ke dancu en la par’
super ĉi montar’.

Rapide
fluis riveret’.
Mire ĝi aspektas, eĉ
bluas. Spegulas nubet’.
Surfaca perfekt’.

Salikej’
riverborde. Nek
unu libelo flirtas.
Salikbranĉoj ploras tre.
Ne plu sunum’ . Ve!

Pensa transformiĝo

Espero
laciĝis. Sento
de hezitem’ altiĝis.
Fi ondojn forblovu vent’
kun la granda pent’.

Homaro
panikas tre. Ve
iuj ridis. Aliaj
gratulas sin mem. Nepre

ekkredu !Vere!

**La dua
aŭ tria ondo!
Vintro estas sur la sojlo.
Miloj mortis en mondo!
Vivu hejmrondo!**

**Reveno
al familiaj
valoroj. Amo, kredo,
espero kaj similaj.
Ĉiuj tre noblaj!**

**Leviĝu
densa nebulo.
Resaniĝu popolo,
malaltiĝu fiuloj!
Vivu bonuloj!**

Ekis vintraj nebuloj

**Jen,vintra
nebulo rara.
Fumo el tuboj miksas
kun nebul' ĉi arbara.
Grizas kampara.**

Nebulo

**kiel kurteno
blanka, forglutas ĉion.
Antaŭ vi aĉa sceno:
Diabla beno!**

**Tamen Sun'
milde savas nin.
Varma leviĝanta Sun'
karesas radie nin,
forpelante ĝin!**

**Tiele
ĝi malaperas.
Jen, forvaporigis ĝi.
Dume ĉio ŝanĝiĝas.
Tero varmiĝas.**

**Novembra
mateno frostas. Ofte vangoj ruĝiĝas.
Niajn manojn ĝi mordas.
Nazo gluiĝas!**

Promeno

**Promeno
laŭriverborde
antaŭ tagmezo. Griza
nubar`pendas senorde.
Vent' tuŝas morde.**

**Frostiĝis
grundo. Humida
odoro de putraĵo.
Vintra morto rapida
kaj viv' perfida.**

**Branĉaro
jam nuda ploras.
Sur la tiliopinto
nur korvoj gaje festas.
Malice grakas.**

**Aero
ve, haladzita
viruse infektita.
Vivo kvazaŭ milita,
popol' maskita.**

**Novembra
serena tago,
suna kun freŝa odor'.
Bona homreago
esti ĉe lago!**

La unua vintra semajno

**Aŭtuno,
adiaŭis mi**

**de vi. Ekdancis vintro!
freŝos aer'. Ĝojas ni.
Bonvenon al vi !**

**Rigardis
mi tra fenestro
fumtubojn vidalvide.
Ho, grizaj fumoĵ, Estro
vidu! Estas tro!**

**Aera
infektado ,ve !
Restis ni longe hejme!
Eltenis ĉion pave!
Vere tre brave!**

**Ekneĝis
tutnokte....Karme?
Por purigi aeron.
Ridis ni okullarme.
Aplaŭdis varme!**

**Sunbrile
jam mateniĝis.
Infanaj ĝojaj krioj
eĥis brue. Noktiĝis!
Ĉio blankiĝis.**

Dum vintras

**Noktiĝas.
Aŭdiĝas fore
laŭta hundobojado.
Lun' salutas nin kore.
Brilas aŭrore.**

**Pasas nokt'
Ornamaj brilaj
trembletas sur fenestro.
Atendas nin novjaraj
festoj. Solenaj.**

**Ĉiam ni
tradicie festas.
en la familia rond'.
gaje ni amuziĝas,
elkore kantas!**

**Semis mi
kristnaskan grenon.
laŭ tradicie festi.
Knedos mi kukopanon!
Bonegan sanon!**

**Ankoraŭ
noktiĝas. Planu**

**vi ĉion por venontaj
festoj. Ni ekdeziru:
ke vivo gajnu!**

Denove neĝas

**Ekflugis
la blanka plumar’
de sur ĉielo. Mira
blanka ĉielo. Flokar’
sur nigra harar’.**

**Neĝeroj
glitis malsupren
laŭvizaĝe milde. Jen
refluganta aeren
ŝvebanta alten!**

**Blankiĝis
stratoj kaj arbar’,
tegmentoj kaj fumtuboj.
Samas urbotiliar’
kaj alta montar’.**

**Ekstere
grundo frostiĝis.
Regas vintra freŝeco.
Mia spir’ vaporiĝis
Pinar’ glaciĝis!**

**Frapetis
neĝeraj gutoj
sur fenestron miksitaj
kun pluvo. Neĝokrioj
“ fi flokovivoj!”**

Januara serĉo

**La varmo
ĉi januara
semajnofinon pasis.
Brilis sun' varma, rara
de neĝ' montara.**

**Sub neĝo
la blanka kapet'
videblas pare, al sun'
pozas. Venis la knabet'
plukis galantet'.**

**Venteto
dancis kun suno
milde karesante vin.
Dum hararo kiel lun'
brilas al la sun!**

**Galantoj
vintraj floretoj**

**estas la heroldoj de
printempo. Kolombetoj
sur la tegmentoj.**

**Revenis
malvarmeco. Ve.
Sune vintro trompis nin.
Estis frue sed dolĉe.
Sed sufiĉa ne!**

Iomete printempas

**Ŝanĝiĝa
milda vetero
printempas. Homoj ĝojas
pro varma vintr-aero,
de nia tero!**

**Ĉielo
ruĝiĝis forte
dum fajra sunsubiro.
Mi tre ĝuis senvorte
ĝis sunomorte!**

**Abrupte
revenis vintro
blankneĝerete kiuj
moliĝas sur la vitro!
Unu neĝolitra!**

Glacia
semajno. Nubar'
jen, kirlanta aeren.
Same kriaĉis birdar'
fluge en rondar'.

Suno

Finfine
sun' radie min
kaptis.Ĝia brilo en
okulo nestis. Virin'
ĝojsalutas vin!

Briletas
sunradioj tra
malseka kaŝtenbranĉar'.
Ĉifona morto putras.
Ludo vetera!

Malestas
la akvoperloj,
baldaŭ vaporigontaj.
Sekiĝis la branĉaroj!
Aŭdiĝis pigoj.

Krepusko
super montaro

**fabeliĝis. Ĉielo
pleniĝis de stelaro!
Vibranta aro.**

**Ĉiela
lakto vojo nun
pompe malfermiĝis. Dum
luno ruĝiĝis .Ĉu pun'
Kongo ĉagren' nun.??**

Natura kaprico

**Kaprice
Verdiĝis herbej'.
ekfloris fruktodona,
la kaŝtena arbarej'.
Jam Junio, hej!**

**Surprizoj
Klimataj ŝanĝoj.
Malfruas somero ĉar
revenis du monatoj.
Je ĉiu malĝoj'.**

**Matenoj
malvarmis ege.
Sur montoj forte neĝis.
Majo finis ventege**

kaj vulkanrege!

Malbonaĵ’.

**Kia vetero
tia ĉiutageco.
Ekis milito.Tero
ektremis .Vero.**

**Suferoj
sangoj kaj bomboj ,
en la dudekunua
jarcento! Scias bestoj!
Ve, al fi homoj!**

JUNIA ŜTORMO

**Ekpluvis,
post fulmobrilo
ektondris forte. Timo
en mia okulpupilo.
Ĉielpafilo!**

**Seka ter’.
Akvo sorbiĝas
rapide.Ter’ vekiĝas.
Herbejo tuj verdiĝas
kaj pli densiĝas.**

Natura

**freŝa spirado
dum akvogutoj brilas.
Valora atendado:
terakvumado!**

**Odoras
tero kaj ĉiuj
florĝardenoj. Plenplenas
frukto arbejoj! Tiuj
bonas por ĉiuj!**

**Norda vent'
forta ĝisoste
penetras kiel akra
ruĝa kapsiko. Poste
blovas ventvoste!**

Somero malfruas

**Nigrigâs
ĉiel'. Strata lum'
kiel lampiroj brilas.
Freŝigâs nokto. Dum
tago varmas sun!**

**Aŭdigâs
ambulanco per
ĝia ulula signo.
Klimato-ŝanĝon sur Ter'**

kaŭzas fi veter’.

**Aperis
sur ĉielo Lun’.
Ĝi grandas tute plena.
Mire lumigas vin kun
ĝi en via sin’.**

**Vizito
neatendita
de juna kolombino.
Ĉu ĝi neinvitita
venis vundita?**

**Kvazaŭ ĝi
dirus: “Homece
vivu homaro.
Vivu ni, pli ĉastece!
Solidarece!**

Imputado kaj suferado

**Somero!
Fine, julio
dum freŝeco fridventas.
Verda salut’. Ĉu io
mankas? Jes, ĉio!**

Mankas al

**ni pli da justec'
en ĉi falsa mondo pro
longdaŭra malverec'
jen, homhumilec'.**

**Ĉu eblas
viktimon oni
alnomi krimulon ĉar
la domon kaj vivon li
defendis por ni.**

**Ĉu vere
tre sukcese regu vi
per duoblaj standardoj?
Sojle de miljaro ni
ne kredos al vi!**

**Ŝanĝiĝos
la mondo. Esper'
restas kiel rimedo,al homkonscio
aer'
kiel homliber'.**

Somerumas miaj pensoj

**Somero
alvenis iom
post iom.Tre ĝuas ni
pro tio. Provu kiom**

eble forgesi tion!

**Revas mi
pri maraj ondoj
el infaneco mia.
Gajaj infanaj krioj
sen patro zorgoj!**

**Milde nin
tuŝis briletaj
ŝaŭme venantaj ondoj,
laŭ duone korp' nudaj
partetoj niaj.**

**Dume ni
plonĝis profunde
de ŝipkavo serĉante
perditan juvelon de
marpiratoj.Ve!**

**Perlo el
trovita konko
gardos mi poreterne
kiel spirita ankro
al vivodanko!**

Klimataj ŝanĝoj

Somere

**sunaj tagoj nin
gajigas. Niaj pensoj
libere vojaĝas.
mi songîs. Vi min.**

**Tage ni
sur riverbordo
ĝuas en freŝa aer'.
Ie fulmis en Nordo
for de dompordo!**

**Flaviĝis
ora kamparo.
Tritikorikoltado!
Kolektiĝis homaro.
kun teĥnikaro.**

**Meze de
varmego ekis
pluvoj kaj inundoj.
Altiĝis pluvegoj ĝis
domo.Mortokis'.**

**Bonaĵo
kaj ĉi malbonaĵ'
ŝanĝiĝas tutsenorde.
Ĉie okazos miraĵ',
estu fi novaĵ'.**

Brulas arbaro

**Ripozas
mi, unu ,du ,tri
horojn. Ekstere ardas.
Soifas aer'. Songi ,
varmon tradormi.**

**La branĉar'
de tilio jam
bruniĝis. Kurta vivo
de foliar'. Por ĉiam
foriros . Fi larm'.**

**En ĝia
branĉaro loĝis
gajaj birdoj kantante.
Vento lule salutis
ilin . Noktiĝis.**

**Ne unu
folio falis.
Ĝia ĉirkaŭaĵ' verdas.
Nur ĝi dancvente mortis.
Nek ĝi lamentis.**

**Malgajas
ĉi arda somer'.**

**Plenas de fumo aer'.
Ekis fajregoj. Ho, Ter'
en granda danĝer'!**

Pigoj

**Aŭgusta
vetero plaĉas.
Tage tre suna, nokte
tre freŝa sed tre mildas,
aer'agrablas!**

**Rigardis
mi pigojn. La par'
faris neston. Panjeto
kovas dum flugas birdar'
Ĝi sen amikar'.**

**Tage sun'
brulas. Sufokas
aer'. Pigo ne plendas.
Pace sorton eltenas.
Mi ĝin admiras!**

**Vespere
aŭdiĝas pigoj!
Kvazaŭ festus post varmo.
Vigljaj sonoj tre laŭtaj .
Koncertas pigoj!**

**Mi ĉiam
miras pri ili.
Kiam venos ido ĉu
kune restos famili' ?
Malpli multepli!**

Urĝa helpo al montaranoj

**Foliar'
flaviĝis. Iuj
jam kuŝis sur velkinta
herbejo. Surstrata uj'
Manĝo al ĉiuj!**

**Formikoj
sube , birdetoj
supre serĉantaj manĝojn.
La gril' ĉe rivereto .
ĉiis kantetoj.**

**Ankoraŭ
somerumas gril'.
La tagoj mallongiĝis.
Aperis surĉiel' mil'
da fi-nubkovril'.**

**Malofte
pluvis. Seka ter'
bezonas akvon. Bestoj**

**estas en granda danĝer' !
Helpu ni al ter'!**

**Soldatoj
kaj bona homar'
kunagis tre sukcese!Estis savita
brutar' ,
de fajro arbar'!**

Ŝanĝiĝoj ĉiam okazas

**Sopiras
mi al Sudo. Ve .
Ĉe mi malvarmo daŭras.
Pluvas . Oni diras ke
revarmiĝos tre!**

**Sopiro
kreskis pli aj pli.
Ŝanĝa veter' rapide
kaŭzis klimatŝanĝojn. Ni
malkvietas pli.**

**Vulkanoj
vekiĝis.Timo
regas inter loĝantar'.
Do, nek helpas ocimo
nek la landlimo.
Malgraŭ ĉio**

**ekzistas dezir'.
Aperas nostalgie
laŭ la memorvojo. Mir'
de granda sopir'.**

**Mi scias
ke karaj homoj
tie ne plu estas. Nur
natur' restas senŝanĝa!
Kiaj mensogoj!**

Kaj miro okazas

**Kvieta
nigra nokt'.Varma
ĉambro plenas de lumo.
Unu leter' el Parma!
Bonvenon ĉarma.**

**Amika
ĝojiga leter'
mildas tenere koron
pro la rara manier',
surprizas ci er'.**

**Amikec'
el tempo fora,
vivas inter homaro,
vigle agrablas. Ora**

tempo. Tutkora!

**Memoroj
dolĉaj vekigis.
Kiom da belaj surprizoj
kiam ni renkontigis.
Ĉu maljuniĝis?**

**Sennombraj
demandoj kreskis.
Duo en lernejskeĉo.
Ja, kamaradeca kis'
amon provokis.**

Lumo

**Novembra
nebula maten'.
Aŭdigis miaŭa blek'
el proksimo de ĝarden'!
Ĉu gastoalven'?**

**Apude
la tilio jam
nudiĝis. Nek unu bird'
alflugis sur ĝin. Sen am'
mortos vivo flam!.**

Kun suno

**ĉio vigliĝis.
Amaso da homoj jen,
tre brue amuziĝis,
pare gajiĝis!**

**Pleniĝis
kafekortejoj.
Tre bonodoras aer'
pro diversspecaj teoj.
Naskiĝis revoj!**

Tempo pasas

**Flaviĝis
Saliko. Longaj
branĉoj pendas malgaje.
Mortaĉas putre. Flavaj
susuras'sekaj.**

**Sur ĉiel'
viciĝis nuboj,
malantaŭ spuroj de Sun'.
Trankvila tago. Krioj
de kolombinoj!**

**Vespero,
jen, pli espera
ol morgaŭa tag'. Tamen
sen suna tre severa.**

Vivo prospera?

**Ankoraŭ
montgrimantoj
surgrimpis venkinte jam
la montopinton! Homoj
fortas en gupoj.**

**Sporto aŭ
ekskurso? Ambaŭ ,
respondis la virino.
Ŝi konkeros la monton laŭ
forta kredo aŭ?**

Decembro festas

**Decembra
stranga pluvolag'.
Nur unufoje vidis
mi lumon dum hela tag'.
Antaŭ fulmomag'.**

**Noktiĝis
frue preskaŭ de
mateno. Kvazaŭ vidis
mi neniam nubojn. Ne
nigran surstrate.**

Bluiĝis

montaro fore.
ankoraŭ sen neĝa. Sun'
fojfoje brulis ore.
tuŝas min kore!

Urbanoj
kolektiĝis por
ornami altan pinon!
Lumigita pino laŭ mor'.
Saluton el kor'!

Verda stel'
jen gaje flirtas
nin honore simbolas.
Por espero ni agas.
Kore progresas!

Fino de la jaro

Ŝanĝiĝis
klimato. Same
jarsezonoj. Branĉaro
nuda ploras sename.
Vintras malvarme.
Decembro
plenas de festoj.
ornamitaj arboj nin
alogas per briletoj
el ardukoloroj.

Jarfino
proksimiĝas. Ho,
kiom da amuzaĵoj
nin atendas. Delekto
de la dompino!

Virusa
pandemio tre
malbone influis nin.
Diru al la festoj NE.
Ĉu rifuzi? Ve.

Aero
neĝe odoras.
Nazon freŝeco pinĉas.
Ekscitaj ni tre miras
dum forte spiras.

Infanoj kaj vento

Eliris
suno frue. Ho,
kia varma kareso.
Ludis kiel infano
kara venteto.

Ĵus blovis
la vent' pli forte.

**Kun krioj ĝi ekflugis
al infanoj forporte
pilkon elkorte.**

**Infanoj
kriis aĉe tre.
“Redonu pilkon al ni”!
“Kaptu ĝin!”—ĝi blovante
ridis fripone.**

**La alia
knabo forlasis
drakon alten flugadi.
La vento ĝin puŝis
pli suben. Miris**

**la knabo.
Kia estas ĉi venteto? Ĉu ĝi solas?
Se jes, mi ludos kun ĝi.
Tio bonas por ni .**

Ŝatas ni dialogojn!

**Vetera
plibonigado.
iom post tom varmas
veter’. Ĉie festado
pro terflorado.**

**Printempe
ekis inundoj
Danĝeroj multobliĝis.
Ekas teroglitadoj,
ŝanĝos fi-tajdoj!**

**En mondo
nova la danĝer’.
Nova koloniismo
floranta!Velkas esper’
pro militaper’!**

**Eŭropo
ŝanĝiĝis multe,
Ĉu civitama milit’???
Ĝi regas tre stulte
Mensogas laŭte!**

**Necertec’
en aer’ pendas.
Kvazaŭ homoj ne scias
KE nur dialog/o/as
ni pacon gardos!**

Naturo ĉiam venkas!

**Vintras. Tre
freŝa vetero.
Avinjo Marta venis**

**kun neĝo sur la tero
kaj en aero!**

**Rigardo
el la tre varma
ĉambro al ĉiuj plaĉas.
Ekstere okulo larma .
Vintro karma.**

**Sur branĉoj
aro da birdoj.
La turtoj kvietiĝis.
arbokavo fariĝis
domo .Tagiĝis.**

**Odozas
ĉio printempe.
Naturo bonvenigas
nin sed homoj malsaĝe
ekmilitis. Ve.**

**La granda
Rusio vane
atentigis Eŭropon.
Provokis ili krime .
Agis malsane !**

Doblasjn standardoj

Milito!!

**Nek mi sukcesis
resanigi la vundojn
kiuj animon premis
kiam ĝi ekis!**

**Ankoraŭ
popolo mia
suferas disĵetita
ekster la domo sia.
Malgajas.Pia.**

**Popolo
forte batita
el domoj elpelita
per bomboj mortigita,
viva bruligita!**

**Trafiko
dela humaj organoj
elprenitaj en Flava
domo .Far'de albanoj.
Mutis eŭropanoj!**

**Ankoraŭ
homojn ni sercâs.**

**Malbono inter homoj
Fiuloj kolektiĝis.
Nazion festas**

Kiam ĉerizoj floras

**Pendants
la plomba nubaro
malrapide disiĝas.
Vento blovas tra branĉaro.
Kaŝas sin birdaro.**

**Ŝtormetas
la printempa pluvo.
Fulma kaj tondra ĉielo.
Nek ĝi plaĉas nek tatu
nur roso de pluvo.**

**Demandoj?
Tondras ĉielo
samkiel ardas tero!
Milita homelpelo.
Monda malbela.**

**Ĉu antaŭ
niaj okuloj
okazas naskiĝo de
la nova mondo. Homoj
venkos! Esperoj**

**kreskas pli
kaj pli.Kanonoj
devas tuj silentigi .
Ni unuiĝu . Manoj
de ĉi E-anoj!.**

Pasko ĉe serboj

**Venonta
Pasko ĉe Serboj
tradicie vekas la
kredemon je homoj,
al spirituloj!**

**Ĉi- jare
la paskogajec'
tre plaĉas al infanar'.
Abundas la kreivec'
pri vivobelecec'.**

**Ĉiu hom'
salutas “Kristo
resurektis!”Alia
respondas “Vere Kristo
resurektis”.Ho!**

**Tritaga
festado pasas**

ene de familio.
Ĉiu gasto bonvenas
kaj bonhumoras.

Ĉi feston
ortodoksuloj
estimas. Ĝi simbolas
Kristokredon laŭ serboj—
la sudaj slavo!

Maja saluto

Saluton
al varma Majo!
Gajiĝas ĉiu homo
ĝue eskursas. Haj, Ho!
Verdiĝas Majo!

Okuloj
brilas. Sur lipoj
ridoj. Animoj plenas
de esper' kaj eblecoj.
En manoj floroj.

Kampero
kvazaŭ magia
tapiŝo. Multkoloras.
Floretoj falis piaj
pro ŝanĝoj fiaj.

Pluvetoj
tamen bonvenas.
Nur birdaro gajiĝas.
Aero tre ŝanĝiĝas.
Noktoj tre freŝas.

Rigardas
mi tra fenestro.
Kia paca aspekto,
kvankam ĝi jam bolas tro!
Dankon , al Majstro!

Cerbumas mi

Ŝanĝiĝos
mondo. La ŝanĝo
tre tre doloras certe.
Ekis “proksi” milito
de USa-ano.

Milito
la plej danĝera
influenta malbone
la mondon.Tre severa
kaj tre fi-vera.

Alvenis
pli varmaj tagoj.

**Baldaŭ ni somerumos.
En la strata kafejoj
bruaĉas homoj.**

**Senfinas
spaco ĉiela.
Ekis la maturantaj
festoj. Io tre hela.
Zumo abela.**

**Plenas ĉi
maja somera
kun surprizoj kaj ŝtormoj.
Falas eĉ fi-hajlero.
Venkas sufero.**

Vejdo

Ido de kaldrono

el la rakontoj pri Afanti

**Afanti
pruntis de riĉul'
tre avara kaldronon
per lupago je kalkul'
ja kun kolerbrul'.**

**Post tagoj
Afanti saĝe**

**elcerbumis rimedon
kaj eldiris kuraĝe
al li malplaĉe:**

**“Mi havas
informon por vi—
tre bonega novaĵo!
La kaldrono, mia Di’,
eĉ naskis al ni**

**ja idon!
Jen bonaĵo, ĉu?”
“Sensencaĵo!” respondis
la riĉul’ en voĉa bru’
kaj aldonis plu,**

**“Ĉu kaldron’
povus naski jen
idon en via mano?”
Afanti kun ruzmien’
ovris per man-ten’**

**la sakon,
elprenis el ĝi
kaldroneton kaj diris:
“Jen estas ĝia id’ ĉi!
Ne ĝin kredas vi?”**

La riĉul'
pensis ĝojplene:
“Kial mi ne profitas
kaj akiros senpene
iom senĝene.”

L' avarul'
jen ŝajnigis sin
ĝoja kaj ruze diris:
“Ho, estas bona destin'
por mi en fascin’

ke mia
kaldron' magia
naskis idon kaj naskos
multe da idoj pliaj
kaj korp-graciaj.

Do, zorgu
pri la kaldrono,
neniel difektu ĝin!”
Afanti laŭ l' ordono,
kun naza sono,

“Ja bone,
bone, via moŝt',
mi flegos ĝin zorgeme,
kaj protektos ĝin en post’

je ĉia ajn kost'!"

Post tagoj

Afanti venis

kaj diris al la riĉul':

"Via kaldron' forsvenis,

ja morte senis."

"Kiele!"

miris la riĉul'.

"Kiel povus la kaldron'

morti? Ĉu l' kadavr' sen spur'?

Ĝi iĝis eĉ nul'?"

Afanti

diris ruzeme:

"Mi jam ĝin enterigis,

kaj ne povas jen plene

doni konvene

kadavron

ĝian nun al vi."

Ili arde kverelis

jen pri ekzisto de ĝi,

kun mallaŭta kri'.

La riĉul'

timis, ke l' kverel'

**allogos najbarojn kun
malfavora konsider'
al li en koler'.**

**Jen vere
l' aliaj venis
kaj li honte foriris.
Finfine li komprenis,
li stulte scenis.**

**Afanti
ne volis vere
lian kaldronon fakte
sed mokis lin prefere,
al venĝo cele.**

Al Luiza Carol

**Alvenas
el Israelo
kelkaj ĉineskaj versoj
ja inspiraj per belo
de verd-espero.**

**Luiza,
kara amikin',
verkas la ĉineskaĵojn
kun sincera am-inklin'
per kora esprim'.**

Sopiro
via al paco
de naturo ja estas
al ni bela donaco—
via sagaco.

Dankegon
jen al vi Carol!
Ni verku kune l' versojn
por la Esperanta rol'
kun insista vol'.

Kiu estas pli frandema?

el la rakontoj pri Afanti

Intence
volis bienul'
moki Afanti foje.
Li kvazaŭ kun venĝa brul'
ruze sen skrupul'

invitis
Afanti humile
al manĝad' de melonoj.
Li kapjesis ĝentile
kaj... kaj plenumire.

Dum manĝad'

li ŝovis ŝtele
ŝelojn antaŭ Afanti-n,
ke melonŝeloj ŝvele
montis surtere.

Bienul’
insidis krie:
“Amikoj, rigardu lin.
Kiel manĝis manie
li senracie.

Li manĝis
multe pli ol ni.
Kia frandemulaĉo!”
Ĉiuj mokridis kun kri’
kaj sen simpati’.

“Ni juĝu,”
Afanti ride
diris, “kiu voremas
plej! La mastro akride
manĝas avide

eĉ ŝelon
de akvmelono,
sed ni nur ĝian karnon.
Li estas, laŭ rezono,
frandema homo!”

Manĝigi veston

el rakontoj pri Afanti

Afanti

**iris al festen',
en eluzita vesto,
ĉe la amika ĝarden'
ĝojplene sen ĝen'.**

**L' amik' lin
vidis kolere
jen trivite vestitan.
Li timis mokon vere
kaj lin prefere**

**irigis
el hejmo sia.
Afanti hejmeniris,
ŝanĝis laŭ plaĉo lia
kaj vid' glacia**

**nov-veston.
Kiam l' amiko
vidis la belan veston,
li ĝojis kun ciniko,
kun bona psiko.**

Invitis

**nun kun fervoro
Afanti al honorlok',
regalis kun bonvolo
lin kun ridfloro.**

**Li montris
manĝaĵojn bonajn
al Afanti kompleze
kaj faris vinproponojn
kaj pervad-spronojn.**

**Afanti
direktis ŝove
manikon al manĝaĵoj,
dirante: "Laŭbontrove
manĝu plejpove**

**frandaĵojn,
ha, nova vesto!"
La mastro surpriziĝis
kaj ĉuis kun protesto:
"Kion la gesto**

**signifas,
amiko kara?"
Afanti jen respondis:
"Mi ne estas erara
nek ag-bizara.**

**Jen vidu,
mi ja direktas
novan veston al mangad',
kiun vi plej respektas
kaj ne neglektas!"**

Mi malkonstruas nur mian etaĝon

el rakontoj pro Afanti

**Afanti
prunteprenis cent
arĝentajn monerojn el
riĉulo kiel serpent'
kun impertinent'.**

**Afanti
konstruis al si
domon kun du etaĝoj,
sed li iom kun anxiety
triste pensis pri**

**repago
de pruntita mon'
al riĉulo, sed staris
jam preta la nova dom'
laŭ sia bezon'.**

Antaŭ ol

li loĝis tie,
la riĉulo vidis ĝin
en bona stat' envie
kaj fantazie.

Li planis
de l' domo bela
loĝi supran etaĝon
kaj per rimed' muela
kaj malsincera

devigis
lin monon pagi.
Afanti tuj konsentis
per domparto repagi
kaj petis tuj agi.

Afanti
jen laŭ lia pet'
donis supran etaĝon
al li kun volonta ced'
por lia posed'.

Afanti
invitis saĝe
kelkajn amikojn helpi
detrui l' domon aĉe
kaj sendomaĝe.

Detruis
muron kun bruo
ili per hojaj fosoj.
Ĝi sin trovis en skuo
sub la detruo.

Elŝovis
kapon la riĉul'
por esplori l' staton kaj
vidis kun kolera brul'
la domon en lul'.

Li kriis,
“Freneza vere
vi fariĝas, Afanti!
kion vi faras cele?
Kiel kruele!”

Afanti
respondis kalme,
“Tio ne koncernas vin!
Ne koleru ja flame
kiel cunamo!”

La riĉul'
kriis, “Ne, ne, ne!
Tio ja koncernas min!”

**Kia malbona ide'!
Se ĝi falus, ve!"**

**Respondo
venis sagaca.
"Ĉu gravas, mia moŝto?
Do, tenu vin mem paca,
sed ne grimaca.**

**Jen vidu!
mi detruas nur
mian etaĝon propran."
Poste ili kun plezur'
agi sen murmur'.**

**La riĉul'
diris timeme,
"Bona Afanti, haltu!"
Li vesuspiris ĝeme
kaj ĉagrenplene.**

**Li petis,
"Do, vendu al mi
vian etaĝon por mon'!"
Ride diris Afanti
jen kun ironi',**

"Tre bone!

**Moneroj ducent
arĝentaj!” kaj la riĉul’
devigite kun konsent’,
veis en lament’.**

La plej bela sono

el rakontoj pri Afanti

Afanti

**gastis plezure
ĉe amik’ muzikema.
Tiu plektris susure
kordojn jen nure**

**anstataŭ
doni kompleze
tagmanĝon al Afanti,
muzikilis apreze
ludis senĉese.**

**Afanti-n
mordis malsato
post tagmez’, sed l’ amiko
ĉuis, “Kia son’, frato,
je via ŝato,**

**de dutar’
aŭ de jevapo**?”
Afanti tuj respondis:**

**“Ili batas per frapo
min sur la kapo!**

**Nur sono,
ho, de la kuler’
tintanta ’tas plej bela,
dum al manĝo sur teler’
ĝi diras kun kver’.**

*** Dutaro kaj jevapo estas ujuguraj muzikiloj.*

Turbano

el rakontoj pri Afanti

**Promenis
Afanti ĝoje
kun korbgranda turbano
sur la kapo ĉi-foje
iun dumvoje**

**renkontis.
Tiu kun ridet’
petis: “Legu leteron
ja por mi analfabet’.
Mi aŭdu en pret’.”**

**Afanti
respondis klare:
“Mi eĉ ne konas vorton.”
Petint’: “Kiel fatale!**

Sed senerare

**vi povas
legi tre bone,
ĉar kun longa turbano
vi aspektas impone
kaj tre renome.”**

**Afanti
ĝin demetis tuj,
volvis ĝin ĉirkaŭ l’ kapon
de la petinto per trud’
kaj diris sen dub’:**

**“Bonege!
Ĉar pensas krede
pri scioj sub turbano,
legu l’ leteron prete
viarimede!”**

Kie estas la kato?

el rakontoj pri Afanti

**Afanti
portis ĝinojn tri
da viando hejmen kaj
petis l’ edzinon el ĝi
fari ja al li**

**pasteĉojn.
Sed lia edzin'
fritis la viandpecojn
kaj manĝis per elimin'
jen sen ajna tim'.**

**Kiam li
volis plezure
manĝi pasteĉojn kaj ŝi
donis nudelojn nure.
Do, li postule**

**demandis:
“Kie la viand’?”
“Kiam mi knedis paston,
la kat’ ĝin manĝis kun frand’.
For ĉiom da kvant’!”**

**Afanti
tuj iris al kat’,
ĝin kaptis kaj pesis ĝin
sur pesilon sen kompat’
malgraŭ ĝia grat’.**

**Ĝi pezis
ĝuste ĝinojn tri.
Li turnis sin al ŝi kaj
diris: “Mia kara, ĝi**

pezas jen nek pli

**nek malpli
tiome vere
kiom kruda viando.
Haha, kiel kruele!
Se mi severe**

**kalkulu,
kie 'stas la kat',
kiam viando pezas
same kiel ĝi en sat'
jen laŭ via ŝat'?"**

Funebre pri Guozhu

**El ĉiel'
falas brila stel',
perdinte lumon verdan
tra la profunda eter'
ĝis la fremda ter'.**

**Ve, Guozhu,
vi hastis vere
rapide, lasinte nin
amikaron pretere
kvazaŭ aere.**

Sufiĉe

**ne ĝuis sate
ni amikecan senton,
ne kunlernis laŭŝate
nek vivis frate.**

**Verkaron
vi lasis al ni,
sed ne nin akompanis
en legad' de poezi'
kun beletra sci'.**

**Ĉineskon
vi la unua
enkondukis kuraĝe,
persistadis senskua
en kread' plua.**

**Poemoj
el via plumo
fluadis tag-post-tage,
jam ĝis dika volumo
kun granda sumo.**

**Tradukoj
viaj plaĉas jen
al ni en bona stilo,
tre facilaj en kompren',
sen ajna leg-pen'.**

Ljaŭĝaj-an*
rakontojn kun pen’
vi tradukis multjare.
Videblas ja l’entrepren’
de granda dojen’.

Ve, Guozhu,
por Esperanto,
vi jam faris multegon
en ĉina verda lando
sed ne por vanto.

Spirito
via inspiras
nin ĉiam dum nia viv’.
Ni ja antaŭeniras,
sen ĉes’akiras.

Trankvilu
vi, kara Guozhu.
Ni daŭrigu l’ aferon,
propran sulkon ni fosu
kaj ne ripozu!

**Ljaŭĝaj aludas la libron “Strangaĵoj de Liaozhai tradukita de Guozhu.*

Yanke

Rododendroj Disfloras

**Sur monto
punktas plene
blank' kun ruĝa nuanco
kvazaŭ brilanta geme,
ha, kaj rubene.**

**Deklive
floroj en proper'
pavas tavolon super
tavolo jen en eter'
ŝajne en fabel'.**

**Rozetaj
petaloj kun sku'
svingiĝas en zefiro,
rave invitaj al ĝu'
por okuloj, nu.**

**Sur branĉoj
ankoraŭ sidas
burĝonoj verdaj hele,
kiuj ovriĝi avidas
kaj l' mondon vidas.**

Matene
roseroj rule
gutas el la petaloj
sur grundon jen susure,
vere plezure.

Senpenta herbeto

Herbeto
kreskanta ĉe voj’
subtretitas de homoj
kruele fojon post foj’,
tamen sen malĝoj’.

Ĝi levas
kapon denove
kaj daŭre kreskas spite,
sin etendas plipove
kaj laŭbontrove.

Subite
sur ĝin falas ŝton’
kaj peze ĝin subpremas,
sed ĝi ne estas poltron’
kun ĝemkria son’.

Ĝi strebas
ŝoviĝi pene
el la ŝtona fendeto,

**ĉu nokte ĉu matene,
vere senĝene.**

**Finfine
post la torturo
natura, ĝi ja sveltas
kaj rektas en ventlulo
jen kun plezuro.**

**Herbeto
kun eteta fort'
sub diversaj minacoj
ne cedas al mava sort'
trans demonaj mort'.**

Sopiremo al printempo

**Ĉi-vintre
vivas mizere
mi jen en izoleco
kontraŭ virus' konkere
kvaz' enbotele.**

**En ĉelo
mi paŝas sola
sen amik', sen karulo
sen parolo konsola,
sen vort' elkkora.**

**Rigardas
mi tra fenestro
domojn, homojn ĉirkaŭe,
volvita per vat-vesto,
ve, sen protesto.**

**Ululas
ekstere vento
kvazaŭ fantomo ploras.
Plias soleca sento
en ĉi momento.**

**Mi legas,
legadas nure
por min distri modere,
vage pensi nebule,
vivi plezure.**

**Mi dronas
jen en komtemplo
pri la libera spaco,
pri la varma printempo,
pri l' ĝoja tempo.**

Vintre en la sudo

**En vintro
sur la suda ter'
ne videblas neĝfalo**

**sed nur lazura ĉiel’
kaj varma sunhel’.**

**Prosperas
floroj en ĝarden’
kaj herboj en junverdo
sen glaciĝa ĉagren’.
kaj neĝfala ĝen’.**

**Sen frosta
penetranta vent’
homoj ĝoje promenas
sur la blua firmament’
ĝis kora kontent’.**

**En akvo
la senglacia
homoj naĝas plezure
kun sento sunradia
kaj ĝu-ebria.**

**En la sud’
sen severa frid’
vivas plantoj tutjare
ĉiam kun miena rid’
en grunda humid’.**

Ho, vere

**belas la tero
sudlanda en la vintro,
sub l' serena vetero
kaj suna helo.**

Malvarma printempo

**Surprizo!
Neĝo en April',
vetero ŝanĝiganta..
Malvarmas neĝokovril'.
Vintra sonoril'!**

**Apenaŭ
aperis suna
tag'. Kiel agrablas ĉi
tuŝoj. Poste malpuna
magio-luna!**

**Grava tag'
Morto de patrin'.
Pasis jarojn. Doloro
restis. La forta virin'
estis ŝi. Ĝis fin'!**

**Vetero
same malgajas.
Ja , nia ĉiutagec'.
Fi pandemio daŭras.**

Tro longe regas.

Venteto

**jen, salutas nin
pelante nubojn. Revas
mi pri Arbaro ĉar min
allogas ĉi pin'**

Printempe

Printempe

**vekiĝas natur'.
Gluiĝas odoroj el
la florpotoj sur la mur'.
Mira aventur'.**

Monato

**Majo admiras.
Matene frostas tage
ventas aŭ ofte varmas,
dum noktoj freŝas!**

Salikej'

**jen, riverborde
verdiĝas . Ĉi-apude
fraŭlin' pozas senvorte,
tute bonorde!**

Fraŭlino

**bela, malgaja
vi estas. Kial okul'
mia, larmoj? Ĉu fia
estas am' Maja?**

**Aperis
suno. Vigliĝas
gaje natur' kaj homoj.
Birdar' pepante jesas
ke jen, pritempas!**

Yi Qiao

Zefiro

**Zefiro
blovas tenere
en korojn kun sopiro.
Ni pasios libere
kaj laŭespere!**

Yumeiren (Belulino Yu)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Kuniĝo

**Rigore blovas vento,
ĉagrenas sento.
Disiĝis ni plujare,
profundas sopiro amare.**

**Salikoj ĉirkaŭ lago,
sunbrilus tago.
Promenus ni kontente,
kuniĝus en revo momente.**

Zhegutian (Pedrika Ĉielo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj
respektive de 7,7,77 / 33,7,77 silaboj, laŭ rimarangô
a,,a,xa / xa,,a,xa (x=senrima)

Zhuang Qixiong (Ĉinio)



Gratulon al 100a Jubileo de KPCĈ

—laŭ ĉinesko Mantingfang*

Fajrer' en lag'
ekbrulis kun
jarcenta boat-hor'.
Pioniroj
strebis por aŭror',
kaj en longa marŝad'
rezistis kun sang-dolor'.
Antaŭen,
granda afer'
ĉiam al honor'.

Ador'
leviĝis;
Ĉiuj krias
el fund' de kor':
Magia ating'—
ankaŭ trezor'.

Ĉini' prosperos sur
silka voj' kun bela flor'.
Ni serĉu
veron per vol'
sub ruĝflaga glor'.

KPĈ: *la Komunista Partio de Ĉinio*

**ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 10 kaj 11 versoj de 446,
466, 7444 / 234, 454, 67345 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xa,xa,,xxa
/ ax,xa,xa,xa,xaa (x=snrima)*